

CxEA-retkomunikoj 3/2001

kiel inicianto de la dissendado de la CxEA-retkomunikoj mi (Petro Chrdle) devas unue peti vian pardonon, ke post la komenco estis tiom longa pauxzo. Espereble nun estos la retkomunikoj dissendataj pli ofte, tamen nur mallongaj kaj (kio laux mi gravas) sen ajnaj aldonajxoj, ke ili estus por vi informfonto portanta neniun gxenon. Se vi tamen ne deziros ricevadi ilin, sufixas mallonga sciigo kaj via adreso estos forvisxita de la dissendoadresaro.

Peto post la reagoj al antauxaj retkomunikoj: multaj el vi reagis kaj sendis al mi retmesagxon. Por cxiuj mi tre dankas al la sendintoj. Bv. kompreni, ke la nerespando neniel signifas mian neemon respondi, sed efektivan mankon da tempo, pro kiu mi ankaux estonte ne povas promesi respondon de plejparto de viaj eventualaj leteroj - sed kreu, ke cxiuj viaj proponoj kaj opinioj estos prijugxataj de la redaktokonsilio, pri kiu vi povis legi en la CxEA-retkomunikoj 01_1. Sed nun - jen la retkomuniko 01_3:

SEKCIO DE INFORMATIKO FONDITA

CxEA fondis novan sekcion - Sekcion de informadiko, kies celo estas kunlaborigi cxehxajn esperantistojn posedantajn kajn ajnmaniere utiligantajn komputilon kaj (se eble!) kun la aliro al interneto - informi ilin pri novaj ebloj ene de Esperantujo (ekzemple pri retaj kursoj, novaj interesaj TTT ktp), helpi al ili prilabori esperantajn tekstojn kaj komune plenumi ankaux aliajn taskojn, kiujn versxajne ekaperos post la efektiva komenco de komunikado inter la interesatoj, estontaj membroj de la sekcio. La sekcio devus ankaux iugrade dauxrigi la laboron de scienc-teknika sekcio de CxEA, precipe en gxia terminologia agado.

Interesatoj pri la membreco en la Sekcio de informadiko de CxEA aligxu cxe la provizora gvidanto de la sekcio Josef Vojacek <vojacek@jumbo.ped.muni.cz>.